Thomas Moore,

# 'T is the Last Rose of Summer

*kun ok-liniaj strofoj*

'T is the last rose of summer
Left blooming alone;
All her lovely companions
Are faded and gone;
No flower of her kindred,
No rosebud is nigh,
To reflect back her blushes,
To give sigh for sigh.

I'll not leave thee, thou lone one!
To pine on the stem;
Since the lovely are sleeping,
Go sleep thou with them.
Thus kindly I scatter
Thy leaves o'er the bed,
Where thy mates of the garden
Lie scentless and dead.

So soon may I follow
When friendships decay,
And from Love's shining circle
The gems drop away.
When true hearts lie wither'd
And fond ones are flown,
Oh! who would inhabit
his bleak world alone?

. . .

Thomas Moore,

# La lasta rozo

*tradukita de Antoni Grabowski*

*kun ok-liniaj strofoj*

Jen floras sola, forlasita
La lasta rozo de l' somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro,
Velkinte kuŝas jam sur tero.
Ne estas ia flor' parenca,
Nek roz-burĝono en proksimo,
Por interŝanĝi la ridetojn
Aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca,
Ĉagrene sur trunketo brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas,
Do iru, dormu vi kun ili!
Foliojn viajn mi afable
Disĵetas sur bedeto jena:
Vi kuŝu apud senaroma,
Malviva kunular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos
De l' amikeco flor' fidela,
Kaj el brilanta amo-ringo
Elfalos lasta ŝton' juvela.
Ĉar kiam velkis veraj koroj,
Sentemaj flugis for el rondo,
Ho, kiu volus tiam loĝi
Solece en malvarma rondo?

. . .

Thomas Moore,

# La lasta rozo

*tradukita de Clarence Bicknell*

*kun ok-liniaj strofoj*

Jen la lasta rozeto
de fora somer'!
Ĝiaj belaj kunuloj
jam velkis sur ter'!
Ne restas parenco,
ne unu rozflor'
Partoprenas kompate
en ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki
tutsola, ho roz'.
Iru dormi kun ili
en paca ripoz'.
Nun viajn petalojn
disĵetas mi for
Al viaj kunuloj
sen viv', sen odor'.

Tiel same volonte
formortus mi mem,
Se ne plu min atendus
amika manprem'.
Ĉar kiu kun koro
en tiu ĉi mond'
Volus loĝi izola
sen amo-respond'?

. . .

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas* THOMAS MOORE *(∗1779-05-28 – †1852-02-25).*

*Arg-531-1058 (2010-03-28 21:25:21)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun poemon el la retejo* **http://www.franks.org/fr01066.htm**. *Pri la verkinto, la irlanda poeto Thomas Moore, vidu la vikipedian retejon* **http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas_Moore**.

*Traduko de la Angla poemo "'T is the Last Rose of Summer " de* THOMAS MOORE *(∗1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de* ANTONI GRABOWSKI *(∗1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-531-1059 (2010-03-28 21:24:14)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo* **http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT**.

*Traduko de la Angla poemo "'T is the Last Rose of Summer " de* THOMAS MOORE *(∗1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de* CLARENCE BICKNELL *(∗1842-10-27 – †1918-07-17).*

*Arg-531-1060 (2014-02-15 14:00:59)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon* **http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell**.